


N-ro 170 aŭtuno 2020

ISSN-1565 3315

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo

האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו



EsperOri

ESPERANTO

+

ORIGAMIO

PRI ORIGAMIO KAJ ESPERANTO LEGU SUR LA PAĜOJ N18-22

REVUO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)

La redaktoro
Mikaelo Lineckij
mikaelo@esperanto.org.il

La reviziantoj:
Gabi Zeevi (Israelo)
Andreo Peĉonkin (Rusio)

ELI-Prezidanto
Jehoŝua Tilleman

La redakcia poŝta adreso: P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo

**Karaj legantoj!**

Bedaŭrinde estis ne multaj ŝancoj enmanigi IsEs-170 tradicie al partoprenontoj la en Zamenhofa vespero. Kune kun IsEs-169 estas dissendita ankaŭ mesaĝo de ELI kun la demando - ĉu ĉiuj volas ricevadi unukoloran paperan version de la revuo? Eble vi volas, ke ĝi venu al viaj retaj poŝtkesto koloro? Tiam sendu al mi viajn adresojn. Pro la situacio, fizikaj renkontiĝoj transformiĝis je virtualaj, danke al la programo ZOOM. Tial en la revuo praktike mankas movadaj raportoj, fotoj... Tamen vi ne enuos - legaĵoj abundos! Via redaktoro...

La retejo:

<http://esperanto.org.il/ie.html>

La enpaĝigo:

Mikaelo Lineckij

Abontarifo eksterlanda:

10 eŭroj. Eblas pagi per UEA al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

ATENTON!!!

Post la interkonsento inter la abonantoj kaj ELI eblas ricevi koloran version de la revuo al sendita de vi elektronika poŝtadreso!

En la revuo kelkfoje estas uzita siglo **NDLR** - noto de la redaktoro.

Enhavo:

IVEK - <i>Amri Wandel</i>	3
Israelo kaj la viruso - <i>Amri Wandel</i>	4
Prelego de Seán Ó Riain (la dua parto).....	10
Vidpunkto de Golda Meir <i>traduko de Tetjana Kolomijec</i>	12
Pri DLT (<i>daŭrigo</i>) <i>Renato Corsetti</i>	12
Atenco en Klajpeda (la dua parto) <i>Norman Berdiĉevski</i>	13
Origamio <i>Larisa Osadĉuk</i>	18
La forpasoj	22
LitSupO. Knabo el Nazareto <i>traduko de Mikaelo Lineckij</i>	23
Juda ruzeco, Scenaro <i>Tradukoj de Mikaelo Lineckij</i>	24
Pri Salomono <i>Traduko de Luiza Carol</i>	25
Kiel eblas komerci <i>Traduko de Mikaelo Lineckij</i>	26
Eterna historio <i>Anĵela Belenko</i>	27
Testo <i>Traduko de Mikaelo Lineckij</i>	28

IVEK - Israela Virtuala Esperanto-Klubo

Amri Wandel

Dum multaj jaroj la Tel-Aviva Esperanto-klubo “Josi Ŝemer” kunvenadis ĉiusemajne en salono, luita de maljunulejo “WIZO”. Kompreneble, pro la koronaviruso, dum la enfermo en aprilo tiuj kunvenoj devis ĉesi, sed ankaŭ poste oni ne povis renovigi la fizikajn kunvenojn, ĉar la maljunulejoj restis fermitaj por protekti la enloĝantojn, pro la pli granda risko por maljunaj personoj.



Kiel pluraj aliaj E-kunvenoj, ankaŭ la tel-aviva klubo fariĝis virtuala. Antaŭ la pandemio vizitis la klubon inter 10-20 tel-avivaj esperantistoj. En la virtualaj kunvenoj la nombro kreskis al kutime 15-30, inter ili israelaj esperantistoj de aliaj urboj, kiuj antaŭe neniam partoprenis la tel-avivan klubkunvenojn pro troa por ili distanco. Iom post iom komencis partopreni gastoj el eksterlando, ĉar mi regule reklamas la kunvenojn en Eventa Servo kaj en la retlistoj “UEA-membroj” kaj Landa Agado. La ligilo de la Zoom-ĉambro estas ĉiam la sama kaj eblas eniri eĉ sen ĝi: sufiĉas klaki la bildon en la hejmpaĝo de la retejo de Esperanto Ligo en Israelo, <http://esperanto.org.il/>. La kunvenoj okazas ĉiun mardon inter 18:30-20:00 laŭ la israela tempo. Kutime la kunveno komenciĝas per interkonatiĝo, aparte kun la novaj eksterlandaj gastoj (pluraj efektive fariĝis sufiĉe regulaj vizitantoj). Poste, ofte okazas specifa programo. Inter la okazintaj programoj estas muzika kvizo de Fransoazo, kantoj tradukitaj de Amir Naor, kantataj de Israela Beker, filmoj kun E-subtitoloj muntitaj de Doron, kiel “Kanalio Blaumilch”, konatiĝo kun la retejo “verkoj.com” de senpagaj E-verkoj redaktata de Amir kaj vegetara kuirado de Doron. En aŭgusto okazis virtualaj kunvenoj i.a. pri la nova n-ro de “Israela Esperantisto” kaj spertoj, programeroj de la Virtuala Kongreso, kaj oni aŭdis pri spertoj de partoprenantoj en la Kongreso. En septembro Amri prelegis pri “nigraj truoj kaj gravitaj ondoj”, kio vekis grandan interesiĝon de eksterlandanoj, kaj oktobre pri la Nobel-premio, aparte pri la Premio pri fiziko, kiu estis proklamita komence de oktobro en lia esplorkampo – nigraj truoj. (*NDLR - noto de la redaktoro: Amri verŝajne simple forgesis mencii, ke kadre de IVEK aŭguste okazis ankaŭ prezento de ukrainaj kantoj*).

Komence de novembro okazis kunveno okaze de la 25-a datreveno de la murdo de **Yitzhak Rabin**, partoprenis ankaŭ pluraj eksterlandanoj. Oni aŭskultis personajn rakontojn, pensojn kaj reagojn pri la temo. Jehoŝua kaj Cvi efektive estis en la manifestacio kiam la murdo okazis kaj ankaŭ la aliaj israeleanoj rakontis kie ili estis tiam. Mirejo (Prez. de ILEI) rakontis ke ŝi aŭdis pri la murdo en la UK en Tel Avivo, kaj Amri prezentis historian registraĵon de la "Kanto al Paco" kunkantita de Rabin minutojn antaŭ sia murdo, kiun li tradukis en Esperanton kelkajn jarojn antaŭe.

Meze de novembro la temo estis **antisemitismo**, okaze de la 82-a datreveno de la Kristal-nokto, (10.11.1938) dum kiu la nazioj detruis milojn da sinagogoj, judajn vendejojn kaj loĝejojn en la tuta Germanio. Kiel honora gasto partoprenis d-rino **Margaret Zaleski-Zamenhof**, kiu emocie rakontis pri siaj spertoj kiel knabino en Pollando kaj pri la historio de la familio Zamenhof en la dua mondmilito. La kunveno estis registrita kaj videblas per la rekta ligilo <http://esperanto.org.il/av/Klubo20Nov10.mp4>.


Israelo: plej infektita kaj plej resaniĝa

Amri Wandel

Modifita kaj ĝisdatigita versio de artikolo jam aperinta en "Ondo de Esperanto", aŭtuno 2020.

La monda situacio.

Preskaŭ unu jaron post la apero de la viruso en Ĉinio, kaj naŭ monatojn post kiam la koronaviruso estis proklamita pandemio, fine de 2020, multaj landoj spertas la duan ondon, pli severan ol la unua. La tutmonda nombro de mortintoj superas unu milionon, kaj tiu de konfirmitaj infektitoj proksimiĝas al 50 milionoj.



La Monda Organizo pri Sano (WHO) taksas ke estas 10-20-oble pli da ne identigitaj infektitoj tutmonde, nome, ĉ. 10% de la monda loĝantaro estis infektitaj. Kredeble ankaŭ la nombro de mortoj estas signife pli granda ol tiu de

registrataj mortintoj pro la viruso, ĉar multaj, aparte en la tria mondo, mortas de Kovid-19 sen esti testitaj kaj identigitaj. Komparante la nombron de forpasoj kun tiu de la sama tempo en la pasinta jaro oni konkludis, ke verŝajne la nombro de la mortintoj estas ĉ. 50% pli granda. Aliflanke, eblas ankaŭ inversa efiko, se oni kalkulas kiel mortintojn pro koronaviruso la forpasintojn, kiuj havis ankaŭ la viruson, pro aliaj kialoj.


Diagramo: Takso de ne-identigitaj infektitoj tutmonde, laŭ serologiaj testoj kaj aliaj parametroj, laŭ kiu ĉ. 10% de la homaro estis infektita per la koronaviruso (Fonto: The Economist, 26.9).

Taga infektigo kaj morto.

Unu el la popularaj (sed ne vere objektivaj) kriterioj de la disvastigo de la pandemio estas la taga nombro de novaj kazoj. Kompreneble, po lando oni devas tion kalkuli relative al la enloĝantaro, pro tio oni kalkulas la nombron de kazoj (la profesia termino por “infektitoj”) je milionoj da enloĝantoj. Kiel montras la grafikaĵo, laŭ tiu kriterio, fine de septembro Israelo estis en la unua loko tutmonde kun ĉ. 700 kazoj je miliono, double ĝis trioble ol Argentino, Hispanio kaj Francio, kiuj tiam troviĝis en la sekvaj lokoj.


Daily new confirmed COVID-19 cases per million people

Shown is the rolling 7-day average. The number of confirmed cases is lower than the number of actual cases; the main reason for that is limited testing.



La nombro de novaj kazoj tage laŭlande, de junio ĝis la fino de oktobro (Fonto: Our World in Data)

Sekve de unumonata enfermo en Israelo kaj alveno de la dua ondo ankaŭ en Eŭropo, la situacio ŝanĝiĝis. Ekzemple, fine de oktobro la taga nombro de novaj kazoj je miliono en Israelo ŝrumpis al 100, dum en Francio, Hispanio kaj Britio ĝi soris al 300-400. Ankaŭ laŭ la taga nombro de mortoj Israelo (4 je miliono) atingis la mondan pinton, malpli ol pluraj latinamerikaj landoj (5-9 je miliono) sed pli ol Brazilo, Usono, Francio, Britio kaj Hispanio (2-3 je miliono).




Pli objektivaj kriterioj.

Ĉar evidente la nombro de kazoj dependas de la nombro de testoj, pli objektiva parametro estas la procentaĵo de pozitivaj testoj, nome la tagaj procentaĵoj de la testoj kun pozitiva rezulto. Konsiderante, ke Israelo troviĝas inter la landoj, kiuj faras pleje da testoj proporcie al sia loĝantaro, la israela “rekordo” laŭ la nombro de kazoj je miliono ne estas tre signifa.

Pozitiva elcentaĵo de testoj laŭlande.

Tamen, la plej signifa parametro estas la morto-elcentaĵo, nome la nombro de mortintoj el cent novaj kazoj tage. Kiel eblas vidi en la grafikaĵo, dum la tuta pandemio Israelo konservis la plej malaltan morto-elcentaĵon (0.5%), signife malpli ol Francio, Hispanio kaj Britio (5-20%), kaj eĉ malpli ol Germanio kaj Usono (3-6%).

Laŭ la pli objektiva parametro, la procentaĵo de pozitivaj testoj (t.e. testoj kun pozitiva rezultato), Israelo (14% fine de septembro, 8% fine de oktobro) troviĝas inter Eŭropo (5-10%) kaj Latinameriko (>20%). (NDLR: Fine de novembro – 2 %, post ioma ascendo de 1.4 % - el 6 500 testoj je miliono da loĝantoj).



Elcentaĵo de mortoj el novaj kazoj tage laŭlande, de marto ĝis la fino de oktobro (Fonto: Our World in Data)

Resume, kvankam Israelo estis la koronavirusa monda ĉampiono laŭ la nombro de infektitoj tage je miliono, ĝi daŭre retenas la plej malaltan elcentaĵon de mortintoj. Alivorte, la plej infektita, sed kun la plej altaj ŝancoj resaniĝi.

Politiko kaj religio.

Kiel Israelo atingis tiujn du kontraŭajn rekordojn? Pri la negativa rekordo de novaj kazoj ŝajne kulpas du gravaj faktoroj en la israela socio: politiko kaj religio, dum la pozitivan rekordon Israelo sendube ŝuldas al siaj sanservoj, inter la plej bonaj en la mondo, kaj aparte al la nekredebla devontiĝo de la medicina personaro, kuracistoj kaj flegistinoj, kiu en malfacilaj kondiĉoj senlace batalis por laŭeble savi ĉiun severan malsanulon.

La unuan ondon, en aprilo (2020), Israelo pasis modele. Estis anoncita ĉ. trisemajna enfermo, kiun la publiko obeeme akceptis. Ĉar ĝi parte koincidis kun la paskoferio, la damaĝo al la edukado kaj ekonomio estis malpli granda ol atendite. Fine de majo la elcentaĵo de

pozitivaj testoj malkreskis ĝis preskaŭ nulo, kaj same la taga nombro de mortintoj. La politikistoj ekspluatis tiun situacion por akiri rapidan politikan profiton, kaj anstataŭ singarde kaj malrapide eliri el la enfermo, la reiro al normala ĉiutaga vivo, malfermo de la lernejoj, amuzejoj kaj amasaj eventoj estis tuja kaj senbrida.

Aldona problemo estis, ke la ekstreme religiece ortodoksaj judaj komunumoj, kiuj kutime ne kunlaboras kun la cetera socio kaj la registaro, rifuzis adaptiĝi al la novaj reguloj, plu preĝante kaj studante dense kaj sen maskoj en la sinagogoj kaj religiaj altlernejoj, kaj okazigis amasiĝojn kaj geedziĝfestojn kun centoj da partoprenantoj sen distanciĝo kaj protektado. Similan efikon havis la amasiĝoj en la arabaj komunumoj en Israelo, okaze de la Ramadan-festo kaj la amasaj geedziĝaj festoj dum la somero.

Pro konfliktoj kaj konkurenco inter la politikistoj, la reago al la rapida rekresko de la nombro de infektitoj longe prokrastiĝis. Oni pro-ponis skemon de loka enfermiĝo en la plej infektitaj urboj kaj kvar-taloj (plejparte tiuj de ortodoksaj judoj de la arabaj komunumoj), sed ĝis kiam la registaro ĝin aprobis pasis plia monato.

Efektiviĝis la avertoj de fakuloj, kontraŭ tro hasta eliro el la enfermo, malsame al tio, kion faris pluraj pli prudentaj landoj.


La rezulto: la elcentaĵo de pozitivaj testoj kaj la nombro de mortintoj ga-lopis reen al la niveloj de aprilo kaj eĉ superis ilin. En aŭgusto la taga nombro de novaj kazoj atingis 2000, en septembro – 5-8 mil. Dum la averaĝa pozitiva elcentaĵo en Israelo estis 12%, tiu en la komunumoj de la ultra-ortodoksaj judoj estis duobla, ĉ. 25%, trioble pli ol en la ne-ortodoksa juda socio.

Dekstre: la procentaĵo de pozitivaj testoj (blue) kaj la taga nombro de mortintoj (ruĝe).

Maldekstre: mortintoj laŭmonate, de marto (plej maldekstra kolumno) ĝis septembro.

Fonto:

“Haarec” 26.9.2020.



Analizo de “The Economist”

Estas interese, ke tute simile analizis la situacion en Israelo artikolo pri la monda koronavirusa situacio en “The Economist”, la 26 -an de septembro, <https://www.economist.com/briefing/2020/09/26/the-covid-19-pandemic-is-worse-than-official-figures-show> (dankon al Eric Shynar): *Israelo donas pretan ekzemplon. Frua kaj bone aplikita enfermo havis la atentadan efikon por redukti novajn infektojn. Sed la tiel aĉetita tempo, kiu povus [servi] por disvolvi test-kaj-spuran sistemon, ne estis bone uzata, kaj la eliro de la lando el la enfermo estis nepripensita. Ĉi tio okazis parte, ĉar la malgranda rondo ĉirkaŭ Ĉefministro Benjamin Netanjahu, ĉe kiu koncentriĝis la potenco, inkluzivas neniun kun signifa kompetenteco; la sanministerio estas malforta kaj politikigita.*

La aferoj plie malboniĝis pro tio, ke sociaj distancigaj kaj baraj ordonoj estas rezistataj de iuj partoj de la socio. Sinagogoj kaj toraaj seminarioj en la ultraortodoksa komunumo kaj grandaj tribaj geedziĝoj en la araba-israela komunumo estis ĉefaj infektaj centroj. La elementoj de la misfunkcio de Israelo havas klarajn paralelojn aliloke.

Enfermo kaj ekonomio

En septembro 2020, la registaro komprenis, ke ĝi perdis la regon de la pandemio kaj decidis pri dua enfermo. Israelo fariĝis la unua ŝtato en la mondo, kiuj aplikis kompletan duan enfermon. Pluraj specialistoj asertas, ke completa enfermo havas nur limigitan utilon, ĉar kvankam ĝi efike bremsas la disvastiĝon de la viruso dum ĝi estas rigore observata, tuj post la forigo de la enfermo la viruso plu disvastiĝas, se oni samtempe ne efike utiligas aliajn rimedojn,

PRI LA TEMO - IOM HUMURE



El humur-kolekto de MaZda - Marian Zdankowski (Pollando)

kiel epidemiajn esplorojn, amasan testadon, eviton de amasiĝoj kaj personaj higienajn rimedojn kiel la maskoj. La sperto post la unua enfermo montris, ke Israelo estis tre malefika en ĉiuj tiuj faroj. Ĉu la situacio post la dua enfermo estos pli bona? Multaj israleanoj dubas pri tio. Granda demandosigno estas kiel reagos la israela ekonomio. Kiel dirite, la unuan enfermon la ekonomio trapasis relative bone, kompare kun aliaj landoj (tamen la senlaboreco eksaltis de preskaŭ nulo al 20%). Oni pli pesimisme prognozas la rezulton de la dua enfermo. Kvankam ankaŭ ĝi koincidas kun festa sezono (la Juda Novjaro), pro tio la tuja damaĝo al la lerneja instruado ne estis tre granda, la lernejanoj de la kvara studjaro kaj plie devos lerni defore dum monatoj. Pluaj negocoj kiel hoteloj kaj restoracioj, kiuj iom-post-iome komencis resaniĝi post la unua enfermo, troviĝas en danĝero de rekolapso. La necerteco pri kiom daŭros de la dua enfermo kaj kiu strategio por eliro el ĝi pligrandigas la publikan timon kaj konfuzon. Aldone, la publiko ne plu estas tiel obeema kiel dum la unua enfermo, kio kredeble kaŭzos, ke ĝi estos malpli efika.

Daŭrigo de prelego de Seán Ó Riain.

(la komencon bonvolu legi en IsEs-169)

Ben Jehuda.

Mi ne multe parolos pri Ben Jehuda, kiu naskiĝis la 7-an de januaro 1858, ĉar vi certe konas lian historion pli bone ol mi. Sed unu aspekton mi ŝatus mencii: la inspiron de Ben Jehuda pri sia agado, ne nur por irlandanoj, sed por ĉiuj homoj, kiuj volas antaŭenigi lingvon. Ĉi-tie mi havas libron en la irlanda, *Athbheochan na hEabhraise: ceacht don Ghaeilge?* [La Revivigo de la hebrea: ĉu leciono por la irlandano?]. Ĝi entenas multajn valorajn informojn pri la vivo de Ben Jehuda, kaj ĝi substrekas la gravecon de lia decido paroli nur hebree kun sia unua infano, Itamar Ben Avi. Estis pro Ben Jehuda kaj lia lingva agado, ke mi ekinteresiĝis pri Israelo, kiel junulo. Interese ankaŭ, ke Itamar Ben Avi, la unua denaskulo de la hebrea post pli ol 1700 jaroj, lernis paroli Esperanton kaj subtenis ĝin kiel plenkreskulo.

Tiu libro irlandlingva de Muiris Ó Laoire estas aparte valora en Irlando, ĉar ekzistas miskompreno pri la revivigo de la hebrea. Multaj homoj ripetas, ke la hebrea nur reviviĝis, ĉar la judoj revenis al Palestino de multaj mondpartoj, kaj ne havis alian komunan lingvon. Ili for-

geŝis, ke inter 1881 kaj 1920 la granda plejmulto de judoj en Palestino venis de Orienta Eŭropo kaj Rusujo, kaj ke ili parolis la jidan lingvon. Do, la problemo ne estis la manko de komuna lingvo, sed kiel anstataŭigi unu komunan lingvon per lingvo pli aŭtentike israela, pli ligita la la juda historio kaj tradicio. Tiu situacio multe pli similas al la situacio en Irlando, kiel jam estas komuna lingvo, sed ĝi estas origine el Anglujo kaj ne el Irlando.

Vi korektos min, se mi eraras, sed ŝajnas al mi, ke estas du ŝlosilaj punktoj pri la agado de Ben Jehuda:

A) li kaj lia edzino decidis paroli hebree hejme;

B) ili decidis paroli NUR hebree al sia unua filo, Itamar.

Jen la ĉefa diferenco inter Israelo kaj Irlando: en ambaŭ landoj homoj lernis la originan nacian lingvon. Tamen, en Israelo homoj ekuzis la hebree pli kaj pli, kaj denaskaj parolantoj de la hebree fari-ĝis plimulto en Israelo. Kontraste, en Irlando nur eta malplimulto de 2% uzas la irlandan hejme ĉiutage, dum la angla daŭre dominadas kiel ĉiutaga hejma lingvo. Oftas simbola uzo de la irlanda. Ekzemple, la 21-an de januaro 1919, kiam konvenis la unua libere-elektita parlamento en Irlando, *Dáil Éireann*, ili parolis nur irlande, krom la laŭtlegado de la deklaro pri la sendependeco, kiu okazis unue irlande, poste france kaj nur trie en la angla! Aldone, de 1922 ĝis la komuna EU-pasporto en 1984, irlandaj diplomataj pasportoj estis nur en du lingvoj – la irlandaj kaj la francaj.

Ludoviko Zamenhof

La tria samtempo, ege bone konata al vi en Israelo! Kelkaj ligoj de Irlando kun Zamenhof kaj kun Esperanto:

A) La unuan legeblan anglan tradukon de la Unua Libro faris Richard Geoghegan, denaskulo de la irlandaj lingvoj kiu tiam loĝis en Anglujo.

B) Geoghegan korespondis kun Zamenhof jam en 1887, kaj mi legis ke estis li, kiu proponis la verdan koloron al Zamenhof, «ĉar ĝi estas la koloro de espero, kaj ankaŭ de mia lando, Irlando». Pri Zamenhof mi ne multe parolos, krom diri, ke lia genia kreaĵo, Esperanto, senfine enriĉigis mian vivon.

Rekomendo al Esperanta Ligo de Israelo.

Kaj mi havas nur unu rekomendon al vi ĉi-tie en Israelo: provu

gajni “oficialan agnoskon fare de la Israela Ŝtato por Esperanto esti parto de la nemateria heredaĵo de Israelo kaj de la homaro“. Pollando oficiale atingis tion por Esperanto en oktobro 2014, kaj Kroatio atingis tion en februaro 2019. Niaj samideanoj en Slovakio, Litovio kaj aliaj landoj nun laboras samdirekten. Tiu oficiala agnosko fare de sendependaj nacioj estas la plej konvinka respondo al la aserto de kontraŭuloj ke Esperanto ne havas kulturon!!! (NDLR - laŭ mi, tio estas atentinda alvoko por promocio de Esperanto en Israelo kaj en la mondo - reeĥu, la interesitoj!)

Opinio de la kvina ĉefministro de Israelo, Golda Meir pri tio, kiel ajna lando povas fariĝi grandsignifa...

Se Vi volas krei tian landon, kien revenos ĝiaj gefiloj, se vi volas krei landon el kiu oni forveturus nur por la feria ripozo, se vi volas krei landon, en kiu forestos sento de timo pri estonteco, faru por tio nur du paŝojn:



- Konsideru korupton kiel ŝtatperfidon kaj same koruptulojn – kiel perfidkrimulojn ĝis la sepa generacio.
- Konsideru tri profesiojn, kiuj devas esti plej altsalajrataj kaj plej estimatindaj: militistoj, instruistoj kaj kuracistoj.

Kaj jen estas la plej ĉefa afero – laboru, laboru kaj laboru, ĉar neniu krom vi defendos vin, neniu nutros vin krom vi mem kaj via lando estas bezonata nur por vi, por neniu alia.

Kiam tio fariĝos ne simplaj vortoj, ne nura slogano, se tio fariĝos via vivmaniero, tio signifas, ke vi sukcesis atingi vian celon.

Tradukis Tetjana Kolomijec (Ukrainio)

Fino de la artikolo “**DLT kaj Esperanto**”, verkita de R. Corsetti.

Bonŝance la Eŭropa Unio decidis doni grandan subvencion por realigi la unuan fazon de la projekto. Pro tiu subvencio la laboroj komenciĝis kaj oni dungis multajn elstarajn esperantistojn, ekzemple

Klaus Schubert kaj Victor Sadler kaj tuj malkovriĝis, ke Esperanto, estas pli klara ol aliaj lingvoj, sed ne complete.

Ekzemple: kion signifas “La murdo de la lernejestro”? Ĉu “La murdo farita de la lernejestro” aŭ “La murdo farita al la lernejestro”?

Tiam oni komencis grandan laboron por malambiguigi Esperanton por la komputilo, kiu iĝis pli kaj pli granda kaj komencis postuli ankaŭ enarĥivadon de kuntekstaj frazoj por kompreni ĉu la vorto “konto” rilatas al “banka konto” aŭ al “konto ĉe retpaĝaro”? Kaj poste venis la verkado de la tiel nomataj dependogramatikoj, por kompreni la strukturon de frazoj, ĉar en Esperanto “Petron batas Paŭlo” kaj “Paŭlo batas Petron” temas pri la sama frazenhavo, ĉu ne?

Post la eŭropa suvencio venis subvencio de la nederlanda registaro kaj la laboroj daŭris ĝis la jaro 1990-a.

Sed la vera problemo estis la manko de klientoj, de grandaj klientoj, kiel ekzemple bankoj, kiuj volus apliki la sistemon por siaj bezonoj. Do, post la fino de la nederlanda subvencio la laboro devis finiĝi. Kio restas el ĝi? Amaso da studoj pri la strukturo de Esperanto. Intertempe la tradukprogramoj iĝis pli potencaj kaj funkciantaj laŭ alia principo (ne gramatika analizo de la tradukendaj lingvoj, sed amasigo da ekzemploj, el kiuj la komputilo elektas.)

Honoron al Toon Witkam kaj BSO pro la granda laboro farita.

NORMAN BERDIĈEVSKI

ATENCO EN KLAIPEDA

(daŭrigo de la IsEs-169)

Tria Akto kaj la ceteraj.

(Marto 1989, 50-jara datrevena celebrado de atenco en Klaipeda). Paroladoj kaj festoj el tutmondaj TV elsendoj esperantlingve: intervjuoj el Litovio, Israelo kaj Pollando kun elstaraj personecoj inkluzive la nepon de Kabe - Kazimierz Bein.

TV-jurnalisto: Nun ni antaŭeniras al Klaipeda por partopreni la celebradon en la urbocentro. Ni elsendas el Klaipeda kaj sidas kun la ĉefo de la Balta Esperanto-Asocio sinjoro Aleksas Vaiĉius, kiu

kiu tre afable revuos por ni la signifon de la atenco el multaj vidpunktoj.

Sinjoro Vaičius: Elkorajn dankojn! Mi havas grandan honoron paroli al la mondo el Klaipeda, el la centro de la epokaj eventoj.

Ĵurnalisto: Sinjoro Vaičius, kia ŝanĝo okazis kiel sekvo de la atenco?

Vaičius: Nia malfeliĉa regiono elektriĝis! La malnovaj malakordiĝoj inter baltoj, poloj, judoj kaj rusoj rompiĝis kaj ni frontis la komunan malamikon. Nia decido kunstari malgraŭ diversaj etnaj, lingvaj kaj politikaj identecoj embarasigis la okcidentpotenculojn, kiuj antaŭ nelonge sensukcese pretendis batali kontraŭ la nazia reĝimo. Kiel vi scias, Germanio provis invadi Litovion por kapti la atencintojn, kiuj intertempe atingis Sovetunion. Sovetio postulis ke Germanio forlasu Litovion kaj formis aliancon kun la poloj - la eventoj kondukis kaj al milito inter izolita Germanio kaj aliaj, kaj al la starigo de Orienta bloko de Sovetunio, Pollando, Bulgario, Romano kaj Hungario (la tri lastaj sub tre intensa Sovetia premo), Turkio, la Baltaj ŝtatoj, Finnlando kaj ribeluloj en la okupitaj partoj de Ĉeĥoslovakio. Tiuj aliancanoj formis solidan orientan fronton. La multnombreco de aliancanaj lingvoj postulis la uzon de Esperanto.

Italio tuj rompis sian aliancon kun Germanio kiam la atenco kondukis al internaj perturboj inter germanaj militgrupoj kiel SA, SS kaj la armeo kiuj interbatalis por kapti regpotencon post la morto de Hitler. La germana publiko treege seniluziiĝis rilate la nazian reĝimon kaj novan mondmiliton. La registaroj en Francio kaj Britio kiuj favoris politikon de kvietigado falis post publika kritiko pro sia netaŭgeco fronti Germanion. Ni bone konas la sekvan historion de la mallonga Dua Mondmilito: la disfalo de la nazia reĝimo kaj arbitraca paco kiun aranĝis Svislando.

Finfine, Francio, Britio kaj Usono konvinkiĝis, ke niaj klopodoj sufiĉe malfortigis la germanan agresivan politikon. Do, ili mobilizis siajn fortojn kaj Germanio ekvidis, ke ĝi devus batali sur pluraj frontoj. La minaco de eĉ pli grandaj perdoj ol en la Unua Mondmilito konvinkis ĉiujn akcepti la svisan pacproponon, anstataŭ-igadon de la nacia reĝimo kaj la uzon de la internacia lingvo Esperanto en ĉiuj regionoj.

La heroa kontraŭstaro de ĉiuj baltaj civitanoj, en diversaj frontoj inspiris nin kunlabori estontece en la pacperiodo. Ni fieras, ke 3 el 12 “mondĉefurboj” de Unuiĝintaj Nacioj estas lokoj, kiuj estis kontestintaj inter diversaj nacioj, etnoj kaj ŝtatoj en la intermilita periodo. Klaipeda (Memel), Dancigo kaj Vilnius (la aliaj estas Montrealo, Bruselo, Triesto, Flensburgo, Malto, Jerusalemo, Goa, Singapuro kaj Hongkongo).

TV-jurnalisto: Elkorajn dankojn! Nun ni aŭdos kaj vidos la celebradon en Jerusalemo kaj intervjuon kun Prezidento de Israelo, Sinjoro Barkai. Ni parolas kun la novelektita prezidento, Sinjoro Moŝe Barkai. Via moŝto, Sinjoro Prezidento, ĉu vi povas al ni klarigi la signifon de Atenco en Klaipeda por la juda popolo kaj la israela ŝtato?

Prezidento Barkai: Mi ne kapablas troigi la signifon por nia suferinta popolo. Multaj judoj travivis la eventojn en Eŭropo en la tridekaj jaroj, kiam atencoj de la rifuĝinto Grynspan la nazioj ekspluatis por emociigi amaskoleron dum la “Kristalnokto”. Ni heredis kvazaŭtitolon de “malfortaj viktimoj”, sed eĉ tiam ni sukcesis kontribui al cionista konstruado de la lando, defendi nian entreprenon ĉi tie kaj ankaŭ batali kontraŭ faŝisma minaco.

Nia malfeliĉa popolo oferis la plej grandan aron da volontuloj al la Hispana Respubliko. Se ĉiu estus sciinta ĉi tiun fakton, la antisemitoj ne estus sukcesintaj disvastigi sian venenon. Ni ne estis nur viktimoj! Ni havis sufiĉe da bravuloj kaj herooj. Ni jam vidis, kiel nigroloj en Usono ĝoje kuraĝiĝis post la venko de la boksisto Joe Louis kontraŭ Max Schmelling. Oni ankaŭ devas memori la venkon de la nigra atleto Jesse Owens, kaj kiel oraj medaloj gajnitaj de li kaj la usona himno forpelis Hitler-n el la berlina stadiono. Ni scias hodiaŭ ke tiaj eventoj kuraĝigis ankaŭ aliajn inkluzive la eperantistojn kiuj simile al ni finfine decidis aktiviĝi kaj heroe batali por propagandi la aferon.

TV-jurnalisto: Dankon, Sinjoro Prezidento. Nun ni aŭdos intervjuon kun sinjoro Władysław Bein, la nepo de Kabe. Saluton Varsovio! Ni havas grandan plezuron babilu kun la nepo de unu el la gravaj roluloj de la Klaipeda Atenco kaj sekvaj eventoj, kun sinoro Władysław Bein. Sinjoro Bein, via avo Kazimierz Bein, pli konata sub la pseŭdonimo “Kabe”, multjare estis taksata kiel la Granda Perfidulo de la Esperanto-Movado. Ĉu vi povas klarigi la rolon, kiun Kabe ludis dum

la dramecaj eventoj? Kial kaj kiel via avo decidis fari tiun tutmondan ŝokan renverson?

Sinjoro Bein: (la nepo) Li tre frue – en 1911 forlasis la Movadon konsciinte pri malefiko de la zamenhofa proverbo ke eĉ “guto malgranda konstante frapante traboras la monton granitan” Li konkludis, ke Zamenhof tragike malpravus, ĉar li ne povis antaŭvidi mondmilitojn, komunismon kaj faŝismon. Li sciis, ke ni devas agi alimaniere sed devis atendi ĝis pli konvena tempo. Ne temis pri “gutoj malgrandaj konstante frapantaj” kaj “monto granita”. Eĉ la monto kreskas!

Mia avo similigis la movadon al greka mito pri Sizifo, kiu rulis la ŝtonon - kaj ĉiufoje kiam la ŝtono alproksimiĝis al la montpinto, ĝi ruliĝis malantaŭen – tio estis nia historio. Kiom da Kabe-antoj forlasis nin kiam la ŝtonoj komencis ruliĝi malsupren! Por detruigi monton, necesas grandega kataklismo! Li agis nur kiel helpanta kuracisto dum la unua mondmilito, sed kiam en la tridekaj jaroj kreskis minaco de la nazioj, li serĉis dramecan agon kontraŭstari la tendencon kaj primokadon de la movado - nome per planado de la atenco kontraŭ Hitler kun la helpo de du fratoj Werner kaj Gerhard el Klaipeda. Ili kunlaboris konkludinte, ke la psikologa efiko de tia ago kaŭzos grandegan mondreagon.

TV-jurnalisto: Via avo provizis la atencintojn per varmaera balono en kiu ili fuĝis el Litovio kaj sur kiu estis skribita slogano ‘Finfine Esperanto Kontraŭbas’. Kaj kion signifas Kabe por ni hodiaŭ kiam oni rekte emas diri “La nepoj vin benos”?

Sinjoro Bein: li simbolas la ŝancon por Esperanto trovi renovigitan dediĉon. Li tute renversas la signifon de la vorto ‘kabei’. Li pruvis ke “kabeado” estis sekvo de nenifarado kaj netaŭgeco kontraŭ danĝeroj. Li antaŭe donis personan signifon al la figuro de la “perfida erarinta filo”, kaj poste revenis al la idealo por, male, ŝanĝi la signifon de kabeado. Sendube, multaj samideanoj estus forlasintaj la Movadon, se mia avo estus restinta pasiva. Mia avo inspiris multajn samideanojn ne ĉesigi la aferon kaj mi kredas, ke li ankaŭ inspiris la uzon de Esperanto en la monda pacorganizado, kiu fondiĝis post la pacarbitraĵo. La nomo kiu antaŭfoje signifis totalan malesperon pri la movado nun ricevis novan senco. Niaj prapatroj samkiel la tuta antinaziista mondo, entuzias-

me legis la telegramojn kiuj estis elsenditaj laŭ la plano de Kabe kaj de aliaj atencintoj. Permesu al mi rememorigi tion al la aŭskultantojn kaj legi la tekston.

TV-ĵurnalisto: Bonvolu, sinjoro Bein. Tio estos vivanta historio por ni.

Sinjoro Bein: (legas) Klaipeda, 23-an de marto, 1939. Gesamideanoj, nia malnova sensukcesa vojo kondukas nenien - al forgeso kaj al eta historia piednoto hodiaŭ samkiel en 1914. Estus pli bone, se iuj memorus nin kiel malsukcesan “Komploton de Klaipeda”, ol kiel proponantojn de ‘nobla ideo’. Esperanto devas havi ŝancon en la estonteco. Lingvo, kiu povas krei ne nur esperantojn, sed ankaŭ aŭdacantojn. Alie, ni interesos nur poŝtmark-kolektantojn. Esperanto ne estis intencita kiel sociala klubo aŭ distra ŝatokupo.

Kial mi totale forlasis la movadon, samkiel multaj miloj da kamaradoj nuntempe kaj en la estonteco? Eĉ sen nova minacanta mondmilito, la samaj fortoj funkcias enkadre de la lingva rivaleco. La fortaj lingvoj influas la parolantojn de malgrandaj lingvoj (samkiel la fortaj potencoj influas la malgrandajn neŭtralajn landojn) kaj konvinkas ilin, ke ili ne taŭgas, sed ni - jes, taŭgas!

La proksimiĝanta milito pravigos nin. Hodiaŭ, ĉu iu memoras pri la kluboj, la solenaj vesperoj, la varbkompanjoj, la kongresoj? NE! La mondo lernis koni la historian valoron de Esperanto kiel de batalanta movado, sed ne aron da stranguloj! Ĉeĥoj, litovoj, judoj, anti-faŝistoj de Germanio kaj Italio, sendependaj ĵurnalistoj kaj ekleziuloj, republikanaj hispanoj, laboristaj sindikatanoj, demokratoj - ĉiuj suferis multe dum la eventoj de 1933-1939. La turnopunkto okazis ĉi tie en Klaipeda!

TV-ĵurnalisto; Kaj por konkludi, nian elsendon, mi aŭdis ke vi referis la faman poemon de Kalocsay pri via avo*. Ĉu vi emas deklami ĝin por ni?.

Sinjoro Bein: Jes, dankon por la ŝanco atingi mondpublikon.

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,
Nun traŭmata en la morto,
Per kia misterplena forto
Vi nin inspiris agi frape;
De vi ni lernis lernantknabe
La lingvon karan heroigi
Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,

Nun devas nepoj vin altigi.
Kaj nun ni miras gape strabe
Pri via karierplenumo
Kaj via Esperanto-plumo
Nun sonas majstre, ne arabe.

*la originala poemo

Rimportretoj XXVII: Kabe (Kazimierz Bein) de K. KALOCSAY
el Rimportretoj, 1931

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,
Droninta vive en la morto,
Kia mister-malica forto
Vin povis de ni preni rabe?
Ni lernis de vi lernantknabe
Kui en la stilretorto.
Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,
Droninta vive en la morto!
Kaj nun ni miras gape, strabe
Pri via karier-aborto.
Al vi la esperanta vorto
Nun eble sonas jam arabe...

Origamio kaj Esperanto - du universalaj artoj por komunikado

Larisa Osadčuk

Origamio estas tradicia japana arto konstrui diversajn modelojn per faldado de kvadrata papero sen uzi tondilon, nek gluon. "Ori" en la japana signifas faldi, "kami" - paperon.

Nuntempe origamio nun vivas sian duan naŝiĝon, oni nomas origamion - "la teknologio de la XXI jarcento" kaj aplikas ĝin en diversaj kampoj: arkitekturo, dezajno, scienco, nuntempaj teknologioj kaj ankaŭ en pedagogio kaj arto-terapio, kiel tre efika ilo por faciligi komunikadon kaj krei interkonfidon. Kial origamio estas nomata la teknologio de la XXI jarcento?



Ĉar ĝi estas pli vasta ol arto. Fakte origamio estas je la vojkruciĝo inter arto kaj scienco (geometrio), la faldado realiĝas laŭ geometriaj linioj uzante:

- simetrion,
- kombinaĵon,
- simplecon,
- logikon,
- precizecon,
- neceson kaj sufiĉon,
- ekonomion de energio kaj tempo,
- serĉon de la plej efika rezulto.

Krome, origamio havas eblon de movo kaj kapablon ŝanĝi la formon de modeloj pligrandigante aŭ reduktante ilin sen perdo de ilia integreco. Tio inspiras sciencistojn kaj inĝenierojn en ilia laboro por krei diversajn ilojn por solvi diversajn problemojn de molekula nivelo ĝis esplorado de universo.

Sed origamio inspiras ne nur sciencistojn kaj ankaŭ instruistojn de bazlernejoj, psikologojn, arto-terapistojn kaj ĉiujn kiuj laboras kun homoj kaj kiuj bezonas ion por allogi intereson kun sia temo kaj faciligi komunikadon, faldado funkcias kiel eta mirinda spektaklo, magia truko, kiu kreas ĝojon, deziron partopreni, lerni tion kaj montri al aliuloj. Ĝi kunigas homojn kaj plifaciligas interkomunikadon. Tiun funkcion origamio plenumis ekde sia naskiĝo - la papero aperis en Japanujo post la sesa jarcento kaj la unuaj modeloj aperis en ŝintoismaj temploj kaj ludis rolon de simbollingvo, signifinte la prezenton de Dio. Poste origamio iĝis simbola lingvo por aristokratio kaj finfine eniris en la domojn de simplaj japanoj kaj iĝis plej grava ŝatokupo por tradicia infana edukado en la familio, iu neverta instrumento de komunikado inter patrino kaj la infanoj.

Granda rolo de origamio en edukado estas konatiĝo de la infanoj kun geometrio, substrekis Fridrich Froebel, fama edukisto de la deknaŭa jarcento, kiu kreis la unuajn infanĝardenojn en Eŭropo.

Ekde la dudekaj jaroj de la dudeka jarcento, dank'al la gran-

dega laboro de fama japana origamiisto kaj disvastiganto de origamio tra la tuta mondo kaj kelkaj aliaj origamiistoj de Usono kaj Eŭropo, origamio komencis sian triumfan marŝadon tra la mondo. Akira Yoshizawa (Ioŝizava) kreis pli ol sescent modelojn de origamio.

Sed por ni estas plej grava tio, ke li proponis universalan lingvon por origamiistoj - simplan sistemon de signoj, per kiu origamiistoj de la tuta mondo povas faldi laŭ skemoj sen uzi la vortojn. Nuntempe origamio marŝas sur planedo kaj gajnas koron de milionoj da partoprenantoj, amatoroj kaj fakuloj, kiuj aplikas origamion en siaj laboroj, ligataj kun komunikado en pedagogio, resaniga praktiko de kuracistoj, arto-terapiistoj kaj diversaj sociaj laboristoj. Ankaŭ kiel simbola nevorta ilo en internacia komunikado. Tio estas kelkaj ekzemploj kiel apliko de origamio en komunikado.

Estas tempo kompari origamion kaj Esperanton por vidi kiumaniere ili povus esti utilaj unu al la alia.

Kio kunigas origamion al Esperanto?

- Ambaŭ estas pli vastaj ol nur "arto" aŭ nur "lingvo";
- Ili estas demokratiaj kaj malfermitaj por ĉiuj sendepende de aĝo, profesio, nek socia nivelo;
- Ili estas en ĉiuj landoj, sub diversaj formoj de organizoj: kunvenoj de diversaj niveloj kaj ankaŭ kiel ŝatokupo de amaso da unuopuloj;
- Ili estas implikataj en la kampo de komunikado, Esperanto kiel internacia vorta lingvo kaj origamio kiel ne vorta ilo, kiu faciligas interkomprenon;
- Ĉiu havas sian propran universalan lingvon, sian gramatikon: Esperanto – dek ses regulojn kaj kvindek da kreipovaj elementoj. Origamio havas simplan sistemon de signoj klaraj por ĉiu origamiisto en la tuta mondo, laŭ kiuj oni povas faldi modelon sen uzi vortojn;
- Ili ambaŭ baziĝas sur la komunaj principoj, kiujn aplikas naturo en sia formkreado: simpleco, logiko, precizeco, sufiĉo kaj neceso, ekonomio de energio kaj tempo por atingi efikan rezulton;

- Ili similas al konstruludo, estas simplaj por lerni kaj instrui;
- Ili vokas senton de ĝojo kaj miro pro la simpleco, beleco kaj rezulto;
- Ili havas grandegan potencialon en disvastigo de internaciaj rilatoj en diversaj de sciencaj kaj kulturaj kampoj;
- Ili enhavas tutmondajn valorojn, ili servas la ideojn de humanismo, paco kaj kunigo de la homaro.

Do dank'al similaj pensmanieroj, logiko kaj ilaroj por labori, origamiistoj povus pli facile ol aliaj homoj adopti la ideojn de Esperanto; ili estas scivolema popolo kaj plejparte kun bonkora rilato al la mondo kaj la homoj, ili kapablas miri mem kaj mirigi la aliajn, ili estas malfermitaj al komunikado, krome, la movado de paperofaldantoj iĝas pli kaj pli juna, ĝi povus plifirmigi nian movadon, se ni kuniĝos kaj konscios la avantaĝojn de komuna laboro.

Kiuj estas tiuj avantaĝoj? Kion povus doni esperantistoj kaj origamiistoj unu al la alia? Vidu mem:

Origamio al Esperanto:

- malkovri malnovan interesan ŝatokupon, kiu faciligas komunikadon;
- allogi novajn partoprenantojn en Esperanto-movadon;
- helpi por ke Esperanto eniru en la lernejojn;
- uzi origamion en edukado por instrui Esperanton;

Esperanto al origami:

- iĝi la laborlingvo por internaciaj kunvenoj de origamiistoj;
- helpi al origamiistoj vojaĝi tra la mondo kaj trovi novajn amikojn;
- montri ekzemplon kiel interesaj kaj diversformaj povus esti la kunvenoj de origamiistoj. Ili povus ne nur senfine faldadi dum tri-kvar tagoj, sed ankaŭ partopreni en ekskursoj, koncertoj, aŭskulti kaj fari diversajn prelegojn, trovi novajn amikojn.

Tiucele, en 2016, ni organizis en Montpeliero, Francio, la asocion *Animation Création Culture Origami* (Animado Kreado Kulturo Origamio) por disvastigi Origamion kaj Esperanton, por lanĉi ĉiujaran internacian kunvenon, kie origamiistoj kaj esperantistoj povus konatiĝi kaj kunigi sian strebon por fruktodona laboro.

Dum la lastaj kvin jaroj, ni partoprenis en diversaj internaciaj kunvenoj de origamiistoj por prelegi pri origamio en edukado kaj malkovri la edukan potencialon de Esperanto, kaj aliflanke ni partoprenis en internaciaj renkontiĝoj de esperantistoj en diversaj landoj por malkovri origamion kiel ĉarman ŝatokupon kaj ĝian potencialon por disvastigi Esperanton.

En 2018 dum UK en Lisbono, nia ideo "kunigi origamion kaj Esperanton" trovis subtenon de tridek esperantistoj, kiuj partoprenis nian prelegon, jesis por krei kaj partopreni en movado, kiu kunigas esperantistojn kaj origamiistojn. Braziliano, Carlos Oliveira, proponis sian fejbukan grupon, kiun li kreis en 2016, por la sama ideo. Krome dum la lasta jaro ni trovis subtenon por tiu ideo ĉe konataj esperantistoj el diversaj landoj: Mikaelo Lineckij kaj Amri Wandel (Israelo), Denis Keefe (Hispanio), Alsandra Madella (Ĉinio), Mikaelo Bronŝtejn kaj Aĥman Junusov (Rusio), Kristin Tytgat (Belgio) kaj aliaj.

En aprilo 2020 ni estis pretaj por fari ekspozicion pri origamio kaj Esperanto en Montpeliero kaj en oktobro provi unuan internacian renkontiĝon; tiun ideon subtenis oni el la urbodomo, sed pro la pandemio ĝi estas prokrastita (orientiĝe) por la sekva jaro aŭ pli poste, laŭ la situacio.

Ofte mi finas miajn prelegojn pri origamio per la frazo "Origamio estas festo, kiu estas ĉiam kun vi", (laŭ fama frazo de Ernest Hemingway). La samon ni povas diri ankaŭ pri Esperanto. Aliĝu!!!

LA FORPASOJ...

Nome de ELI-estraro kaj israelaj esperantistoj ni esprimas niajn kondolencojn al:

Eldad Salzman – lin forlasis la gepatroj **Varda** kaj **Jehoŝua**
Gabi Zeevi – lin forlasis la filino **Michal** kaj la fratino **Maria**, kiu estis fama esperantistino kaj eldonisto de Esperantaj libroj, edzino de ano de Akademio de Esperanto, **Vilmoŝ Benczik**.
Nican Cvi Kohen – lin forlasis la avino **Ester**.



KNABO EL NAZARETO



Unu el Sankt-Peterburgaj familioj, jam delonge fuĝintaj en la "historian patrujon", decidis montri al infano, naskiĝinta jam en Israelo, urbon de liaj gepatroj. Do, venis ili en gloran urbon Sankt-Peterburgo, promenis tra ĝi kune kun la admiranta infano, montrinte al li la pontojn, palacojn,

kaj venis en la faman "Someran ĝardenon". Ĝuste tie ĉio okazis... Indas menci, ke la infano aspektis kiel vera anĝelo: grandegaj ĉiel-blujaj okuloj, belegaj preskaŭ blankaj harbukloj. Vera pupo... Kaj evoluanta signife pli ol kutima bebnivelo. En Israelo li loĝas kun la gepatroj en urbo Nacrat-Ilit, alivorte, en supra Nazareto. Promenante en "Somera ĝardeno" la infano atentis iun maljunulinjon, aspektantan kiel Di-adorantino, kiu knarante sidiĝis sur la benkon. La gepatroj iris antaŭen kaj la komunikema, kiel ĉiuj 5-jaruloj, knabeto alparolis la avinjon...

- Ĉu io doloras vin, avinjo? – demandis la knabeto.

- Jes, - respondis la oldulino, - maljuna mi estas, io en la dorso krakas, la kruroj ne volas iri...

Kaj, eksentinte spongecan aŭskultanton, komencis rakonti al li pri siaj malsanoj, ĉagrenaĵoj. Kaptinte la paŭzon la knabo per siaj okulegoj rigardis al ŝi kaj tre sincere diris:

- Avinjo, mi volas, ke vi neniam plu sentu dolorojn!

La kortuŝita oldulino demandas lin:

- De kie vi aperis tiom bona?

- El Nazareto, avinjo...

La maljunulino, suprenleviĝinte la okulojn glitis de sur la benko...

Traduko de M.Lineckij

JUDA RUZECO

Moĉjo aĉetis kontraŭ cent dolaroj azenon de maljuna kamparano. La kamparano devus venigi al li la azenon post du tagoj.

Do, la kamparano venis, laŭ la interkonsento, sed sen la azeno.

- Pardonu, sed la azeno, ho ve, subite mortis.
- Tiam redonu al mi miajn cent dolarojn.
- Mi ne povas, mi jam sukcesis elspezi ilin.
- Do, simple donu al mi la azenon.
- Sed kion vi faros kun ĝi? - demandis maljunulo.
- Mi havas certan ideon.
- Kiu ideo povas esti pri mortinta azeno?..
- Ne maltrankviliĝu, kredu min. Mi petas vin, ke vi al neniuj diru, ke



ĝi estas morta.

Post unu monato la kamparano renkontis Moĉjon.

- Rakontu, kio okazis al tiu mortinta azeno?
- Mi lotumis ĝin - tiu estis mia ideo. Mi vendis kvintcent loteriajn biletojn po du dolaroj. Rezulte mi ricevis entute okcent naŭdek ok dolarojn da profito.
- Kaj ĉu neniuj protestis?
- Nur unu junulo, ĝuste tiu, kiu gajnis la azenon. Li estis tre kolera. Por trankviligi lin mi simple redonis al li liajn du dolarojn.

LA PLEJ KURTA SCENARIO

Fama itala filmreĝisoro Federico Fellini vetis kontraŭ legendeca scenaristo Tonino Guerra, ke tiu ne sukcesos verki plenvoloran filmscenariojn nur 10 sekundojn longa.

La sekvan tagon la fama scenaristo alportis jenan tekston: “Virino spektas televidilon. Ĝi montras elsendon pri starto de kosmoŝipo. Aŭdeblas rea kalkulo: 10... 9... 8... 7... 6... 5... Ni vidas ŝian vizaĝon, sur kiu videblas fortaj emocioj. Ĉe la lastaj sekundoj ŝi prenas telefonaŭskultilon, numerumas... La kalkulo daŭras: 4... 3... 2... 1 kaj tuj post la starto ŝi prononcas: ‘Venu, li forflugis’ ”.

Traduko de Mikaelo Lineckij



En la antaŭa numero vi legis pri famulo Davido kaj nun vi povas legi pri alia famulo - reĝo Salomono
(traduko de Luiza Carol)

La reĝo **Salomono** estis konsiderata la plej saĝa homo en sia tempo.

Onidire foje, du virinoj venis kun bebo al Salomono kaj petis justecon. Ĉiu el la du virinoj diris ke la bebo estas sia, kaj ili atendis ke la reĝo decidu kiu estas la vera patrino. Tiam Salomono ordonis, ke oni distranĉu la bebon kaj donu po unu duonon de la bebo al ĉiu virino. Unu virino ĝojis pri tiu decido.



La alia freneze kriis, surgenuiĝis kaj petegis la vivon de la infano eĉ se oni donos ĝin al la alia virino. Salomono diris: “Tiu kiu protektas la vivon de la bebo estas la vera patrino. Al ŝi oni donu la bebon.”

Onidire foje, la reĝo Salomono sonĝis pri sia patro, la forpasinta reĝo Davido. Tiu ĉi rakontis al li pri la ĉiela Jerusalemo, kiu similis la teran Jerusalemon, sed enhavis belegan templon meze de ĝi. La reĝo Davido priskribis tiun templon laŭ ĉiuj detaloj, por ke lia filo konstruigu iun similan sur la tero. Sed li aldonis, ke oni ne devas uzi feron por la konstruado, ĉar feron oni uzas por armiloj kaj tial ĝi ne taŭgas por la sankta templo kie la homoj preĝos por paco. Kiam Salomono vekigis, li volis plenumi ĉiujn konsilojn de sia patro. Sed kiel tranĉi ŝtonon por la templo, sen uzi feron? Maljuna konsilisto de la reĝo, sciigis lin pri iu vermo kapabla tranĉi ŝtonon. Sed tiu vermo troviĝis ĉe la malica demono Aŝmedaj. Salomono estis tiom forta kaj riĉa danke al tio, ke li portis sur sia fingro magian ringon, kun la sekreta nomo de Dio gravurita ene de ĝi. Salomono ricevis tiun ringon de sia patro, kaj uzis ĝin kelkfoje por alvoki demonojn kaj ordoni al ili diversajn aferojn. Ĉi-foje li alvokis la demonon Aŝmedaj kaj petis de li la vermon kiu tranĉas ŝtonon. Sep jarojn daŭris la konstruado de la Granda Templo de Salomono en Jerusalemo, kaj dum tiu tempo la reĝo tenis la demonon enkatena en la palaco, por ke li ne malhelpu la konstruadon. Sed post kiam la Templo estis finkonstruita, ĝi estis tiom bela, ke la reĝo pri fieris pri ĝi tro multe kaj li fariĝis tro vanta. Salomono ne plu toleris la fakton, ke Aŝmedaj estis tiom potenca. La reĝo volis ekkoni ĉiujn sekretojn de Aŝmedaj, kiel kondiĉo por liberigi lin. Sed Aŝmedaj estis tre ruza kaj manipulis la vantecon de la reĝo. La demono petis havi la magian ringon dum nur kelkaj sekundoj, por klarigi al la reĝo iun sekreton. La reĝo fariĝis tiom memfida, ke li supozis ke eĉ sen sia

ringo estus pli forta ol la demono. Kaj evidentiĝis ke tio estis granda eraro. Aŝmedaj forĵetis la ringon, kiu flugis super Jerusalemo kaj super montoj kaj valoj ĝis ĝi atingis la maron kaj falis profunden en ĝin. Poste Aŝmedaj forĵetis la reĝon ege malproksimen, en dezerton de fora lando... Dum dekoj da jaroj Salomono vagadis tra fremdaj landoj. En la komenco li estis almozulo, poste oni sklavigis lin, poste li eskapis kaj faris diversajn humilajn laborojn... Foje, li kaptis fiŝon en kies ventro li trovis la magian ringon. Li metis ĝin sur la manon kaj subite revenis en sian palacon. La jardekoj de vagado vaporiĝis. Salomono estis denove la juna kaj potenca reĝo, kiu ĵus konstruis la belegan Templon en Jerusalemo. Sed nun lia saĝeco multe kreskis, ĉar li ne plu estis vanta kaj aroga. Li lernis respekti la humilajn homojn, lernis kion signifas malriĉeco, sufero, maljusteco...

JEN KIEL NECESAS KOMERCI

Venis foje viro antikvaĵ-butikon, rigardis ĉion kaj intencis jam eliri. Subite li rimarkas: ĉe la eliro kato lekas lakton el telereto sur kiu estas portreto de Tutanĥamono! La VII jarcento antaŭ Kristo!!! La viro revenas al la vendobreto kaj indiferece diras al la vendisto:

- Pardonu min, mi estas soleca homo, loĝas sen la amikoj, sen la parencoj... Via kato tre plaĉas al mi. Eble vi vendu ĝin al mi, ĉu?
- Ne, ne, eĉ ne pensu pri tio... Ĝin tre ŝatas miaj infanoj!
- Mi tre ekamis ĝin... La tutan vivon mi revis pri tia kateto... La okuloj, koloro de la felo... Mi al vi donos kontraŭ ĝi dek dolarojn...
- Ne, ne, ne, ĝi ne estas vendata...
- Nu, mi tre petas vin... Dudek dolarojn! Tridek!

Post duonhoro ili interkonsentis pri 100\$
La viro kun kato enmane estas foriranta kaj jam ĉe la pordo turnas sin:

- Ĝi, veŝajne, al kutimiĝis trinki el tiu telereto, ĉu mi povas preni ankaŭ ĝin?
- Ne, ne.
- Mi donos al vi ankoraŭ dek dolarojn...
- Pri dek dolaroj eĉ ne temu. Tio ja estas Tutanĥamono, VII j.c. a.K... Mi tiumaniere vendis jam kvardek tri katojn...



Traduko de Mikaelo Lineckij

ANĴELA BELENKO

ETERNA HISTORIO

Vespero. En la ĉambro estas geedzoj.

Li, reveninte post la laboro, jam vespermanĝis, nun sidas en mola fotelo kaj legas revuon. Ŝi staras ĉe fenestro kaj rigardas straton. Silento estas longa, finfine la edzino alparolas la edzon.



Ŝi:

Jen ekstere neĝo falas,
Ĉie ĉio estas blanka,
neĝo kuŝas sur la branĉoj...
Kara, kredas vi, aŭ ne?
Kredas vi aŭ ne?

Li:

Mi al vi, tutcerte, kredas,
ja ne povas esti male:
de mateno ĝis vespero
ĉe fenestro staras vi,
longe staras vi!

Ŝi:

Nia filo paŝis sola!
Li ĵus falis kaj denove
provis paŝi mem sen helpo...
Kara, kredas vi, aŭ ne?
Kredas vi aŭ ne?

Li:

Mi al vi, tutcerte, kredas,
ja ne povas esti male:
mi laboras sen ripozo
kaj duope estas vi,
hejme estas vi!

Ŝi:

Al mi ŝajnas iufoje
Ke vi iros malproksimen,
Mia sonĝo tion diris...
Kara, kredas vi, aŭ ne?
Kredas vi aŭ ne?

Li:

Mi al vi, tutcerte, kredas,
ja ne povas esti male:
vi edzino estas mia
kaj vi bone konas min,
bone konas min!

Ŝi:

Ne normale estas tio –
vi silentas kaj konsentas,
ni ne povas eĉ babili!
Tedas tio ĉi al mi,
tedas tre al mi!

Li:

Mia kara edzineto,
Por mi jes, indifere,te,
mi deziras nur ripozi
kaj trankvilon volas mi,
pacon volas mi!

Mi revuon provas legi,
vi babilas kaj babilas!...
Ĉu vi paŭzon faros, kara?
Vin silenti petas mi!
Milde petas mi!

Ŝi (post ioma silento):

Jen ekstere neĝo falas...

Laŭ la tradicio, la lasta paĝo de la revuo
prezentas por vi, kiel oni diras,
provoketon por ioma cerbumado.

Provu respondi la suban demandon:



kiu estas numero
de la parkloko,
okupita de la
aŭto?

La plej toleremaj legantoj konatiĝos kun
ĝusta solvo en la sekva, 171-a numero de
“Israela Esperantisto”, sed, se iu ne povos,
aŭ ne volos atendi tiom longe,
telefonu al mi +97254 3146626,
kaj mi helpos. Via Mikaelo...